
# Aŭstraliaj  Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**

**PLENUMITA 14/07/2022 Kvincentnaŭdekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron


Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko* *Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 711,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 299,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas 166,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas 147,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas 99,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**
**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Eĉ la fuŝa studo de la angla plifaciligas la estontan studon de Esperanto en ne latin-alfabetaj landoj. *Roger S.*

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*



## la esperanta retradio



**Donas Bonan Ĉirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.**

Enakvaj naskoj alportas verajn avantaĝojn

9A JULIO 2022

# Robert (Bob) Felby iĝis 90 jara je 11 Julio 2022






Bob Felby naskiĝis la 11-an de julio 1932 en Danio. Li esperantumis jam en Eŭropo kaj lia tuta aŭstralia vivo estis traplektita per Esperanto-agado. Pro Kovimo en la lastaj du jaroj ni renkontis lin malofte. Ĉi-foje dek unu esperantistoj iris al Mt. Barker, kie Bob nun loĝas, por kuncelebri lian naskiĝtagon. Elkorajn gratulojn al vi, Bob! *Katja Steele*

Kvin jara malnovaĵo per Marcel. vidu AE331

**RUSA POLITIKO.** Ĉu vi memoras la flugmaŝinakcidenton en Ukrajno antaŭ kelkaj jaroj, en kiu akcidento mortis ĉiuj vojaĝantoj, inter kiuj tre multaj delegitoj por internacia kunveno por ekologie savi nian planedon? Nu, tiu flugmaŝino MH17 estus fluginta sendanĝere super la orienta Ukrajno, se la iama rusa prezidisto Gorbaĉof, de ukrajna deveno, ne estus, en sia grandanimeco, doninta kiel donacon al la tiam ekanta nova nacio Ukrajno grandajn areojn da ruse parolanta teritorio, aŭ se Ukrajno estus rifuzinta tiun donacon. M.L.



*Marcel Leereveld.*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 16a de Julio estos la tria sabato. Espere, la vetero pli bonigos Venu ! *Roger Springer*.

## El Adelajdo

La 7-an de julio kunvenis dek unu adelajdanoj - el tiuj kvar ĉeeste kaj la ceteraj per Zoom. La ĉefparolanto, Helen Palmer, prezentis al ni interesajn, nekutimajn mapojn. Trevor Steele aldonis lingvajn taskojn: laŭ difino trovi la kaŝitajn vortojn.



Surfote: Helen Palmer, Sandor Horvath kaj Trevor Steele


Kun amika saluto, *Katja Steele*

## Talentaj lernantoj el Adelajdo




Surfote estas du Adelajdaj instruistoj - Trevor Steele kaj Andrew Woods kun siaj E-lernantoj. Trevor ĉiusemajne instruas al Sebastian (maldekstre) kaj Andrew al Levy. La komuna renkontiĝo en kafejo okazis la 3-an de julio. *Katja Steele*

**La ĉiu taga tasko.** Mondvoĵaĝantaj Esperantistoj verŝajne antaŭe rekontis multajn specojn Kaj aliaj specoj??











Zorgu. La akvo ne estas je sama nivelo
*Roger Springer*



Kuregis junulino tra la urbeto. Subite ŝi vidis saĝan, grizharan maljunulon. La maljunulo ridetis al ŝi.

"Vi aspektas tre feliĉa" diris la junulino, "kio estas via sekreto pro longa kaj kontentiga vivo?"

"Mi fumas tri paketojn da cigaredoj ĉiutage" ridetis la maljunulo. "Kaj mi trinkas keston da viskio ĉiun semajnon. Mi manĝas nur grasajn manĝaĵojn kaj neniam gimnastikas".

"Ĉu vere? Diris la junulino, kaj kiom aĝa vi estas?"

"Tridek du" respondis la griza maljunulo.

*Bob Felby*

Ree, tre grava afero

# Nia kara Bob Felby fariĝis 90-jarojn!!

La pasintan Sabaton, 11 Esperantistoj renkontis en restoracio en *Mnt. Barker* por festi la naskiĝtag-datrevenon de nia plej bona Esperantisto en Sud-Australio - ***Bob Felby.***

Multaj el ni provis memorigi nin pri kiom kaj kiel multe Bob laboris por disvastigi Esperanton en Sud-Australio ekde kiam li kaj lia kara edzino Audrey venis al Adelaide en la 70aj jaroj.

Li daŭre instruis, helpis organizi kunvenojn, Somerlernejojn ktp kaj ni ne forgesu liajn muzik-talentojn!  Kaj Bob ĉiam estis en bona humoro kaj gaja humuro!

Kiel bonŝanca ni en S.A.estas!

Kompreneble ĉiuj deziras ke li ankorau guos pliajn jarojn aŭ eĉ jardekojn da sano kaj feliĉo.

Dankon Bob pro ĉio kion vi faris kaj kontribuis al la Esperanta vivo en Adelajdo!










Indrani Beharrylall

La plej juna Esperanta ĉeestanto (Andrew) alparolis la plej aĝan Esperantiston Bob!

# TRANSDONO DE LA ARKIVO DE UEA AL LA ESPERANTOMUZEO DE LA AŬSTRIA NACIA BIBLIOTEKO

En 2021 la Komitato de UEA akceptis la rekomendojn de la Estraro, Komisiono pri Financo kaj konsilantaj komisiitaj fakuloj, ke la Arkivo de UEA kaj neduoblaĵoj de la Biblioteko Hector Hodler, kiuj troviĝas en la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo, estu transdonotaj al la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB) en Vieno. La CO ne havis fizikajn kondiĉojn tiajn, kiajn havas profesia institucio kiel ANB por la konservo de tiuj materialoj, nek disponas fakulojn por ilia katalogado kaj traktado.

En la unua semestro de 2022 UEA kaj ANB kompletigis la unuan etapon de tiu laboro, nome la unuan identigon kaj transporton de la materialoj de Roterdamo al Vieno. La transdono okazis surbaze de donackontrakto, kiu certigas la konservadon de la donitaĵoj fare de ANB **por ĉiam** kaj laŭ la internaciaj normoj adoptitaj por la administrado de palpeblaj moveblaj kulturaj heredaĵoj, kiel estis identigitaj la arkivo kaj ĉiu donacitaj materialoj fare de UEA. Laŭ agnosko de ANB la Arkivo de la UEA estas "mondskale unu el la plej ampleksaj kaj gravaj arkivoj pri Esperanto kaj la internacia Esperanto-movado. ! [...] La UEA-arkivo elstaras per sia abundeco kaj diverseco. Ĝi enhavas arkivaĵojn same kiel ampleksajn kolektojn de afiŝoj, fotoj kaj aŭdvidaj dokumentoj. Tiel ĝi ebligas profundajn kultursciencajn kaj filologiajn esplorojn pri Esperanto



*Katja Steele*

## El la 56a BET ( Baltaj Esperanto-tagoj) salutas la legantojn de la Aŭstraliaj Esperantistoj

*Grazina, Emi kaj Franciska*



